

Numero: 277.
Junio: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Flugantaj jaroj

La jaroj flugas rapidege, kiel aglo sur la blua firmamento. Ĝin haltigi oni ne povas, kvankam mi ofte tion ĉi treege deziras.

Nun ŝajnas al mi, kvazaŭ hieraŭ mi estintus lerni Esperanton en tiu fora somero kun mia amiko. Nerimarkeble forflugis la jaroj, eĉ jardekoj.

Komence ĉio estis nur interesa ludo. Tiam ankoraŭ ni ne suspektis, la zamenhofa lingvo estas giganta fenestro, per kiu ni povos vidi la tutan mondon.

Tiam ankoraŭ ni ne sciis. Nur tio estis klara, ke tiu ĉi lingvo estas pli facila ol la rusa, kiun ni lernis en la lernejo, kiel devigita lernobjekto.

Ni havis malmulte da lernomaterialoj. Bone, se ni havis gramafonon kaj poste magnetofonon kaj radioaparaton. Per tiuj ni povis aŭskulti esperantolingvajn elsendojn de Radio Polonia aŭ aliaj radiostacioj ĉe la mallonga ondolongo. Sed la kvalito de la aŭdebleco estis tiom malbona, ke el la programoj ni aŭskultis preskaŭ nenion. Tamen ni ĝojegis, ĉar Esperanton ni aŭdis kaj ni fieris pri ĝi.

Nuntempe kiu deziras aŭdi la vivantan lingvon, tiu enŝaltas komputilon kaj interrete oni povas elektadi el pluraj esperantolingvaj programoj, eĉ jam ekzistas ankaŭ Esperanto televido kaj multaj filmoj.

La mondo ŝanĝiĝis multe. Tiel estas bone. Nun ekzistas multegaj esperantolingvaj programoj, kiuj helpas la lingvolernadon.

Antaŭ nelonge mi serĉadis en interreto, kaj nur tute hazarde mi entajpis kelkajn esperantajjn vortojn kaj ĉiufoje la serĉilo montris al mi miloj da adresoj, kie oni povas esperantumi.

Nur tio estas la problemo, oni ne scias kion rigardi aŭ aŭskulti, ĉar ekzistas tiom multe da lokoj, kie Vi povas renkonti nian amatan lingvon.

Esperanto kaj interreto estas du fratoj. Nun jam oni ne povas vivi sen interreto kaj mi tre esperas, alvenos tempo, kiam oni diras ankaŭ tion pri la zamenhofa lingvo.

Nun ankoraŭ la naciaj lingvoj regas en nia mondo, ĉefe la angla. La homaro jam travivis kelkajn epokojn, kiam oni manifestis la privilegion de iu lingvo kaj fine post la falo de la politika kaj ekonomia potenco la favoratan lingvon oni forgesis aŭ jam ĝi ne estis tiom grava, kiel antaŭe.

-Redaktanto-



En buso

La buso estis plenplena de pasaĝeroj. Ĉiu sidloko estis okupita. La starantaj homoj staris malvaste unu apud la alia.

Longe nur la motoro de la buso zumis. Neniu parolis. Ankoraŭ estis tro frue matene. En tiu tempo oni ne ŝatas babili.

Ĉe la pordo staris junulo kun granda tornistro. La sidanta maljunulo strange rigardis lin. Post longa observado li diris al sia edzino:

-Certe tiu junulo estas turisto.

-El kio vi pensas? – demandis la edzino.

-Li havas grandan tornistran kaj ankaŭ lia haŭtkoloro estas alia, ol la ĉi tiea homo. Ĉu ne? Rigardu, lia haŭto estas flava kaj eĉ liaj okuloj estas aziaj. En gazeto mi vidis tiajn homojn.

Nun jam ankaŭ la edzino interesiĝante rigardis la junulon kaj ŝi elbuŝigis dormeme:

-Eble vi pravas. Ĉu li estas japano?

-Mi ne scias. Li povas esti ankaŭ ĉino au vjetnamo.

-Ne, vjetnamo ne vojaĝas sola. Li estas ĉino. Oni diras: „Estos mondfino, kiam ekaperos la flava dangero.”

-Tiam baldaŭ ĝi okazos – ekridis la viro. – En la lando jam ili estas multope. Ĉiu dua vendejo kaj magazeno apartenas al ĉinoj.

-Kiel vi opinias, ni devos lerni ankaŭ la ĉinan lingvon? Mi kompatas la estontan gelernantojn. Kiel ellerni tiom multega da signoj per kio la ĉinoj komunikas.

-Ne timu, ni jam estas maljunuloj kaj ni ne devos lerni ĝin.

-Ĉu vi scias certe? Ne forgesu, ni havas genepojn, kiuj nun lernas anglan kaj germanan lingvojn en la lernejo. Ĉu ankoraŭ lerni ankaŭ la ĉinan? Terure!

Ili mutiĝis. La junulo apenaŭ povis stari en la skuiganta buso kun la tornistro. Ĉe ĉiu turno li preskaŭ faliĝis. Dank' al Dio ĉiufoje en la lasta momento li povis kapti permane la prenilon.

La virino kompatas lin.

-Kara, almetu vian pakajon al niaj piedoj, tiel por vi la vojaĝo estos pli komforta.

La junulo komprenis el la parolo nenion, sed kiam iliaj okuloj renkontiĝis, el la briloj de la okuloj de la virino sentis bonkorecon kaj li dankeme diris ion en sia lingvo. Sed tion la virino ne komprenis. Krom tio sekvis haltejo kaj la pasaĝeroj komencis elbusiĝi.

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XII-a

-Ĉu vi estas onklino Izabela? – demandis ĝoje Johano kaj li tuj kuregis al la oldulino.

-Kiu mi estas? – ŝi demandis iom mire.

-Kie ni estas? Ĉu vi scias la respondon? Mi komprenas nenion.

La onklino restis ĉe la pordo kaj ŝi ridetis mistere plu.

Johano deziris ĉirkaŭbrakumi ŝin, sed lia amata onklino detiriĝis de li.

En la unua momento li rimarkis nenion strangan. Li ĝojegis, ke fine povas revidi sian parencon. Li kredis, ke liaj suferoj kaj aventuro finis. Ili povos hejmeniri kaj daŭrigi la ferion sur Luno.

-Ni iru hejmen! – proponis Johano al la virino.

-Ankoraŭ ni ne povas hejmeniri – diris la onklino Izabela monotone kvazaŭ maŝinvoĉo. –Unue ni devos aranĝi kelkajn aferojn tie ĉi.



La onklino Izabela preteriris Johanon kaj ŝi ekiris al la direkto de la fenestro.

-Onklino, kial vi iras al la fenestroj? Ili estas fermitaj. Mi jam provis malfermi ilin – diris Johano. – Mi deziras hejmeniri. Kion ni devas fari?

-Kelkajn aferojn.

-Kun kiuj?

Denove la onklino silentiĝis kaj ŝi ne respondis.

Tio estis tre stranga por Johano. Alifojie la oldulino ĉiam estis babilema. Senĉese ŝi parolis kaj parolis. Nun ŝi diris nur kelkajn krutajn vortojn kaj ŝi apenaŭ atentis pri sia nevo.

Kial ŝi ŝanĝiĝis tiom? – demandis de si Johano kaj li ĵetis rigardon al ŝi. Ankaŭ la movoj de la oldulino estis strangaj.

Ĉu ŝi estas efektive lia onklino, kiu atendis lin en la flughaveno?

Eble ankoraŭ li dormas kaj songas tiun ĉi nerealan scenon.

La onklino Izabela atingis la fenestron. Tie ŝi haltis. Apenaŭ pasis du aŭ tri sekundoj ŝi turnis sin kaj revenis al Johano.

-Onklino kara – li diris serioze – vi estas tiom stranga. Diru al mi sincere, kio okazis? Kie mi estas? Kion oni volas de mi?

La oldulino deprenis ion el la manteko. Li ne vidis bone, kio ĝi estas. Ĝi estis rondforma, nigra objekto.

Johano interesiĝante rigardis, kio okazos. Unue la onklino Izabela nur prenis la rondforman objekton. Li jam deziris demandi, kio ĝi estas, kiam en la salono iĝis profunda mallumo. Estingiĝis ĉiu lampo kaj lumo. Nenio estis videbla. Li vidis nek la oldulino, eĉ bruo ne estis aŭdebla.

Ĉu li blindiĝis aŭ surdiĝis? – ektimis Johano kaj nerveze li komencis orientiĝi en la salono.

-Kara onklino mia, kio okazis al ni? Helpu!

Longe ne venis respondo. la oldulino silentis. Eble jam ŝi ne estas tie. Ŝi malaperis tra la sekreta pordo, kiel ŝi venis.

Johanon kaptis eksterordinara sento. Antaŭ nelonge li nur konjektis, ke la vidita estaĵo ne estas lia onklino Izabela. La tuta vidaĵo estas nur trompo kaj iluzio. Vere li ne komprenis, kiel oni faris tion. Verdire tie ĉi ekde sia alveno li travivis kelkajn neklarigeblajn aventurojn. Por li estis tre stranga, kial li estis fermita en tiun mucidan kelon kaj poste kial oni portis tien ĉi en tiun ĉi brilan, elegantan, senhoman salanon.

Li jam estis proksime al la frenezigo. Tiu ĉi subita mallumo estis tre timiga. Cefe tial, ĉar li ne sciis kio sekvos. En ĉiu momento li atendis atakon kontraŭ li.

Sed li ne komprenis la kaŭzon. Se almenaŭ iu klarigus al li, kion oni deziras de li. Kial okazas al li tiu ĉi neĉiutaga ludo? Ĉu tio ĉi estas normala afero kun la novalvenintaj gastoj?

Kiam li ekscios la veron aŭ por mi tiu ĉi teruraĵo restos sekreto por ĉiam?

(-daŭrigota-)



Poezio

Ni legu versojn, ĉar ili dolĉigas nian vivon. La bona poemo estas kiel mielo, kaj legante ĝin oni povas senti sin en ĉielo.

Por mi estas strange, ke ekzistas homoj, kiuj neniam legas versojn. Kiel ili povas vivi tiel? Tion mi ne komprenas. Ĉu homo povas vivi sen akvo aŭ aero? Certe vi scias la respondon: NE.

La homa cerbo baldaŭ mortas kaj la korpo nur vegetas.

Laŭ mi neniu deziras tian senaniman vivon. Do, legu ĉiutage versojn kaj ne evitu tiun ĉi spiritan nutraĵon!

Poemoj de Yohanes Manhitu

Scia fluo nehaltigita

Scio kruciras tra la lingvo
kaj riĉigas homan menson,
poste ĝi elvenas tra vortoj
en skriba aŭ parola formo.

Komenciĝas el parola formo,
homoj mense scion konservas
kaj ĝin pasas al la nova generacio
tra rakontoj fluantaj el la buŝo.

Tiu nova idaro scion ricevas,
kaj ĝin aplikas, kaj transdonas.
Novaj alvenantoj miksiĝas kun ili,
ilin montras vojon konservi historion.

Utiligante braĝon kaj ŝtonplaton,
ili transdonas eksterlandan scion.
Ĉiuj literoj proprajn sonojn havas
kaj signifas ion se kunstariĝas.

Do, ekde tiu miriga momento,
multe da scio oni litere konservas
kaj la nuntempa idaro rapide forgesas.
Se ili forgesas, ili trovas en skribaĵo.

Tamen, ne nur en skribaĵoj,
scio troviĝas ankaŭ je diversaj iloj,
trovita pere de la okuloj kaj oreloj
kaj utiligita por beligi nian vivon.

Verdire, homa scio estas plurforma,
kiel arbo kun trunko, branĉoj, kaj folioj.
Tial, scio ne fariĝos kompletforma
se nur unu pleniganta la cerbon.

Noemuti-Timoro, aprile 2011

Sufera frukto



Al diligentaj laborantoj

Akvo fluas el brila vasta frunto
pleniganta malhelan vizaĝon.
Tiu akvo estas ŝvito pro suno bruliganta,
la vizaĝo estas de farmisto.

Pluvo kaj sunbrilo estas vizitantoj
donantaj bonan kaj malbonan mesaĝojn.
Paseroj kaj kolomboj estas malamikoj
ŝtelantaj malgrandajn pecojn de oro.

Tio estas la kruca sufero de farmisto,
tio estas la vojo de farmisto al paradizo;
tio estas la pordo de farmisto al feliĉo;
tio estas la paso de farmisto al beno.

Kiam vi trovis akvon bolantan nevarman?
Kiam vi trovis hakilon akran neakrigitan?
Bonkvalita feliĉo ekaperos el suferado.
Por manĝi kiel reĝo, laboru kiel sklavo!

Noemuti-Timoro, februare 2011
Esperantigita el la poemo "Sutaise in fuan",
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes
Manhitu



Por infanoj

La pomo de la malriĉa homo

Iam trans la Fabeloĉeano vivis tre malriĉa homo. Krom unu pomo li havis nenion. Ĝi estis en lia sako kaj li tre gardis ĝin. La malriĉa homo ne volis manĝi sian pomon.

Se li estis sola, tiam li ofte admiris ĝin kaj li parolis al la frukto, kvazaŭ ĝi estintus viva estaĵo.

Kompreneble se iu venis, li tuj kaŝis ĝin.

En iu tago la malriĉa homo tre malsatiĝis. Dum la tuta tago li manĝis nenion. Vespere li jam ege suferis pro la malsato. Malgraŭ tio li ne volis manĝi la pomon.

Sen manĝo li pretiĝis enlitiĝi kaj dume li tre ĝemadis pro la malsato.

Neatendite el la sako li ekaŭdis parolon. Unue li pensis, ke li halucinas.

-Homo, ne hezitu! Manĝu min!

-Kiu alparolis min? – demandis mire la malriĉa homo.

-Mi estas via pomo. Ne hezitu, manĝu min! Ja, vi estas tre malsata.



Li vane kontraŭis la proponon, fine la pomo sukcesis konvinki lin.

La malriĉa homo prenis el la sako kaj kun dolora koro li volis ekordi ĝin. Tiam en tiu momento okazis miraklo. La pomo elrulis el lia manplato kaj li rulis sur la mezon de la ĉambro kaj tie tuj fariĝis riĉe primetita tablo kun multaj diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Tie estis tiom multe da manĝaĵoj, ke ĝi sufiĉus por la tuta vilaĝo.

Li ne volis kredi al siaj okuloj. Unue li pensis, ke la diablo ŝercas lin. Li timeme altabliĝis kaj li komencis manĝi. Li estis tiom malsata, ke dum mallonga tempo li manĝis ĉion, kio estis sur la tablo.

Kiam li satiĝis, kontente li viŝis sian buŝon kaj li trinkis iom da vino. Kiam la manĝado estis finita, el la tablo denove fariĝis bela ruĝa pomo.

La malriĉa homo ĝojegis al sia bonŝanco, kaj li apenaŭ povis dankegi al la pomo, ke ĝi nutris lin.

-Se vi denove estos malsata, tiam ekordi min kaj antaŭ vi estos primetita tablo kun diversaj manĝaĵoj. Sed atentu, la sorĉo realiĝos nur tiam, se oni estas vere malsata!

La malriĉa homo havis tre envieman najbaron. Li ne komprenis, ke lia najbaro ĉiam havas manĝaĵon. Antaŭe li ĉiam malsatis. Li ne povis imagi, kiel ĝi povas okazi?

Vespere li kaŝiris al la fenestro de la malriĉa homo. Li tre ekmiris vidante, ke el la pomo fariĝas primetita tablo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.



Li decidis akiri la pomon.

Tage la malriĉa homo ĝenerale laboris en la ĝardeno kaj ĝis vespero li restis tie. Kiam tagmeze li dormis iomete en la ĝardeno sub la granda juglandoarbo, lia najbaro ŝtelis la pomon.

La ŝtelisto antaŭĝojis, kiom multe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj li havos. Ilin li vendos al la vilaĝanoj kaj li fariĝos pli riĉa.

Rapide li portis ĝin hejmen kaj li ne atendis ĝis vespero. Li tuj deziris provi la miraklan pomon. Kiel li vidis ĉe la malriĉa homo, ankaŭ li ekordi la frukton kaj atendis.

Pasis unu, du, tri minutoj, sed okazis nenio. Li denove ekordi la pordon. Ankaŭ nun ne fariĝis primetita tablo en la ĉambro. Li volis ekordi ankaŭ triafoje la pomon, tiam el ĝi elsaltis bastono kaj ĝi komencis bati la envieman najbaron. Ĝi batis, bategis ĝis li reportis la pomon al la malriĉa homo. Sed tio ĉi ne estis sufiĉa, ĉar li devis pardonpeti kaj krome promesi, plurfoje li ne faros tian fiagon.

Kompreneble la malriĉa homo ne koleris pri li, eĉ li invitis sian najbaron vespermanĝi. Li ekordi la pomon kaj baldaŭ antaŭ ili jam estis tie la riĉe primetita tablo. Ekde tiam ili ĉiam kune vespermanĝis. Dank' al la pomo en la estonto ili neniam malsatiĝis.

-Onklo Adalberto-



Aŭtomobiloj

Aŭtomobiloj

